

BELGA ESPERANTISTO

47a Jaro — N-ro 5a — Majo 1955a

Fondita
en 1908a



Redaktejo-Administrejo :
ĉe la Prezidanto de R.B.L.E.:

Maur. JAUMOTTE

Avenuo De Bruyn, 44

Wilrijk-Antverpeno

Oficiala monata Organo de

REGA BELGA LIGO ESPERANTISTA

Asocio sen profita celo,

aliganta al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Abonprezo:

Fr. 100,-

La 3a Beneluksa Kongreso - Utrecht

Jen ni lastafoje invitas vin al la 3-a Beneluksa, kiu samtempe signifas kaj por Flandra Ligo kaj por Belga Ligo por L.E.E.N. Jubilea Kongreso!

Fine de aprilo jam pli ol 200 enskriboj estis registritaj (inter kiuj pli ol 70 el Belgujo), tiel ke la sukceso estas garantiita; ankaŭ la programo enhavas multajn logajn punktojn, inter kiuj ni nur citu: la kantaton de Frieso Molenaar kaj la prezenton de la teatraĵo de Vondel, nomo „Gijlsbrecht van Aemstel”!

Lastminute ni ekscias ke la Ĉef-Ministro de Nederlando Drees akcepti lokon en la honora Komitato de la Kongreso.

La oficiala akcepto fare de la Urbestaro okazos sabate je la 16.30 h. tiel ke la membroj de F.L.E. kaj R.B.L.E. devos nepre veturi per la vagonaro de la tagmezo (Bruselo Z. 12.24, Bruselo N. 12.36, Antwerpen O. 13.20 por atingi Rotterdam je 14.51 kaj finveturi al Utrecht je 15.15 h. (alveno U.: 16.02 h.), se ne okazos ŝanĝoj en trajnhoroj Someraj.

Por scii ĉiujn detalojn atente relegu la n-rojn de via organo ekde decembro pasinta kaj konsultu la kongreslibron, kiun vi ricevos en la kongresejo.

Ni nur memorigu ke la Kongresejo estos en Hotelo Smits, Vredenburg 14 kaj ke ĝi estos malfermita jam sabate tagmeze. Krome memoru ke la oficiala malfermo, vespera festo kaj balo okazos en Gebouw voor Kunsten en Wetenschappen, Mariapl. 27.

Vi jam scias ke la kongresa sekretariino estas: F-ino A. J. M. Perk, P. Potterstraat 18, Utrecht kaj ke la kongreskotizo estas resp. 60 h.fr. kaj 4,50 n.guld. La pagoj okazu por membroj de F.L.E. kaj R.B.L.E. resp. al F-ino J. Terrijn, Raapstr. 74, Gent (p.ĉ.k. VEB no 2321.50) kaj s-ino J. Plyson, rue Jourdan 185, Bruselo (p.ĉ.k. Belga Kongreso de Esperanto, no 3766.98): la nederlandanoj al la kongresa kasistino postĝirkonto 6403.23 je la nomo de „Penningmeesteresse Tria Beneluksa Esperanto-Kongreso, Utrecht”

Nu, ĝis baldaŭ! Ni kore akceptos vin kaj vi neniel bedaŭros vian ĉeeston!

L.K.K.

Grava ŝanĝo de la programo!

Estas granda ĝojo por la L.K.K. povi komuniki, ke en la vespero de dimanĉo, post la kantato de Frieso Moolenaar, la kongresanoj povos ĝui la prezentadon de la „Gijlsbrecht van Aemstel”.

Dankon al ĉiuj, kiuj ebligis tion, nome:

1e. la teatra grupo de N.K., kiu tute senprofite prezentos la teatraĵon;

2e. la tradukinto, S-ro Ir. J. R. G. Isbrucker, kiu sen ia ajn kondiĉo tuj permesis la prezentadon;

3e. la ĉefestraro de L.E.E.N., kiu — pro la jubileo — malavare promesis pagi la kostojn!

Tial la L.K.K. volonte rezignis la prezentadon de filmoj. Ĝi esperas ke ĉiuj kongresanoj same opinios.

La Diservoj.

Pro diversaj cirkonstancoj la L.K.K. ne povas publikigi jam nun la detalojn. Vidu en la kongreslibro.

Fotografado.

La oficialan kongresfoton oni faros la unuan pentekostan tagon, je duono post la dektria. Venu kvaronhoro antaŭe!

Loko: sur la ŝtuparo de la tria ĉef-administrejo de la fervojoj.

Al la amatoroj, kiuj faros fotografaĵojn dum la kongreso la L.K.K. petas bonvoli sendi unu foton al la redaktoro de nia gazeto kaj unu al la sekretariino de la L.K.K. por la arkivo de nia sekcio. Ni anticipe dankas.

La promenoj k.t.p.

La sekretariino de la L.K.K. ne ricevis

LA GVIDADO DE NIA LIGO

Dum la lasta kunsido de la Administrantaro kaj dum la Ĝenerala Jar-kunsido de nia Ligo, kiuj ambaŭ okazis, en Bruselo, sabaton, la 30an de aprilo, la Prezidanto, S-ro M. Jaumotte, faris varman alvokon por akiri kelkajn pliajn kunlaborantojn por efektivigi la ligestaran laboron.

Li proponis ŝanĝojn al la Regularo pri Interna Arango, kiuj celas faciligi tiun kunlaboron de novaj fortoj.

Ni ĉi sube donas la tekston de la ŝanĝita regularparto:

La administrantaro estas jene kunmetata:

A: la aligintaj grupoj kun ĝis 50 membroj proponas unu administranton kaj plian por ĉiu komenciĝinta kvindek, laŭ ciferoj je la 31a de decembro de la antaŭa jaro;

(Sekvo sur paĝo 37)

ian deziron rilate al la urbaj promenoj antaŭ ol la redaktoro bezonis ĉi tiun artikoleton por la nuna numero. Sed, fidu la organizantojn: vi certe legos kiujn ekskursetojn vi povos partopreni.

La loĝado!

Jam frue la L.K.K. avertis vin! Nun estas eble mendi lokon nur en hotelo, se vi bontrovas dormi kun du aŭ tri samideanoj en la sama ĉambro. Bonvolu sciigi tion kune kun la mendo.

Alie ni devas serĉi en pensionoj kaj ĉe privatuloj, sed ankaŭ tie oni multfoje havas nur dupersonajn ĉambrojn!

La tuttaga ekskurso.

La aŭtobusojn ni jam mendis. Ankoraŭ kelkaj lokoj en ili estas liberaj. Laŭvice la interesigantoj ricevos la kuponon, sed atentu bone: la L.K.K. ne povos lui plian aŭtobuson! Se ĉiuj lokoj estos rezervitaj ĝi do ne povos iun ajn akcepti.

„NON OLET“

„En Trento oni trovis skeleton
„el la tria jarcento antaŭ Kristo;
„en ĝia pugno ankoraŭ premiĝis
„monero“.

(La ĵurnaloj)

Multaj dirmanieroj, proverboj, sentencoj ĉiulingvaj rilatigas la monon, la „teran ŝlimon“, kun odoro kaj odorigaj substancoj kaj agoj. Esperanto, ilo de nematerialista movado, nur tradukis la ĝenerale konatan „mono odoron ne havas, sian devenon ne diras“ „Non olet“...

Malpli sciante estas, ke tiu fluganta vorto, precipe en nuna tempo malkaŝe aplikata, estas kreaĵo de l' roma imperiestro Vespasiano (69-79). Tiu ege praktika viro, nepre bezonante ŝtopi truon en la ŝtata monkesto, metis imposton sur la Fulonojn, kiuj formis specialan gildon, komisiitan kolekti en Romo la likvajn ekskrementojn. Tito, lia filo, ne akordiĝis kun la patra procedo kaj faris — tio okazas en la plej bonaj familioj — pro tio rimarkojn, ĝuste kiam la unuaj impostoj enspeziĝis. Tiumomente ja estis, ke la neromantika Romano prenis moneron en la manon kaj ŝovis ĝin sub la nazon de filĉjo kun la fifamaj vortoj: „non olet“!

Fakte la Romanoj havis delikatan nazon kaj se ili ofte pri la mono ne perceptis malbonan odoron, ili tamen konsciis pri higieno kaj publika pureco, kiuj — kun ĉia respekto — tute mankis al niaj praaĵoj kaj kiujn ili verŝajne ne imitis de siaj okupantoj pro pura patriotismo. Ankaŭ tio okazas. Tial troviĝis en antikva Romo multaj publikaj latrinoj kaj urinejoj kaj en la tempo de Diokleciano (284—304) oni nombris ne malpli ol 144 „malŝarĝejoj“, en kiuj la urĝitaj civitanoj krome — nenio nova sub la suno — senŝarĝigis sian pezan koron sur la murojn. Ekz. jam en 68 estis afiŝita en tia loko insulta versaĵo kontraŭ Nero (54—68) pro kio la prudentuloj, timante la koleron de la tirano, ĝin evitis.

La puramaj Romanoj, kiuj ne konis sapon, kvankam en la malnovaj kulturlandoj oni uzis tiucele specon de argilo, sin helpis en la imperiestra tempo per...urino. La „urinolavon“ faris ĉe ili la suprenomitaj Fulonoj, kies patrono estis Minerva mem, de kiu ili ŝajne pruntis saĝon kaj scion. Ili lokis en la stratoj de Romo specialajn potojn por la urinokolektado kaj fermentigis la kun danko ricevitajn produktaĵojn dum dek tagoj, kun sekva amoniakeca sapigo de la grasoĵoj. Plue oni lavis en grandaj vazoj kaj kuvoĵoj, tretante la lavotaĵojn per la nudaj piedoj. Ĉu tiu procedo mem ne kaŭzis odoraĉon la historio ne ra-

40-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO 30.VII - 6.VIII, 1955 BOLONJO Italujo

JUBILEA KONGRESO

Adreso: Kongreso de Esperanto ĉe CIT, Piazza Nettuno 2, Bologna
Banko: Banka di Napoli, Bologna, konto 2824
Giro: Grupo „A. Tellini“, Medaglie d'Oro 3, Bologna, 8/20620

OFICIALA KOMUNIKO

Dua Bulteno: Jam sendita al ĉiu aliĝinto en marto.

Limdato de aliĝo: Konforme al la Kongresa Regularo de U.E.A. la L.K.K. rifuzos akcepti aliĝojn post la 30-a de junio. La aliĝiloj devos esti en Bologna je tiu dato. Je la 30-a de junio la L.K.K. fermas siajn kontojn por fari la necesajn kalkulojn prete por la kongreso. Sekve ne sendu monon al L.K.K. tiel ke ĝi atingos Bologna en julio.

Transporto en Bologna: La urbestro de Bologna jam promesis senpagan veturadon dum la kongresa semajno.

Nomigo de strato: Promesite estas, ke dum la kongreso la magistrato ceremonie inaŭguros straton kun la nomo ESPERANTO honoro al la kongreso.

JUBILEO: La urbestro de Bologna invitis al la Jubilea Kongreso la urbestron de Bologna-sur-Mer, hejmo de la Unua Kongreso.

Vesperaj aranĝoj: La festoj okazos jene: sabaton - Interkona Vespero; dimanĉon - Inaŭguro de I.S.U. kaj programo de dancado por gejunuloj; lundon - Teatra Vespero (La Revizoro de Gogol en traduko de Zamenhof); mardon - Kongresa Balo; merkredon - Arta Vespero (muziko) kaj gejunula programo; ĵaŭdon - libera (gejunula programo); vendredon - Jubilea Vespero.

Glumarkoj: Folio de 25 belaj, kun ora surpriso, glumarkoj - 50 lirojn, 1 rpk. Mendu ĉe la kongreso aŭ ĉe perantoj

LOĜIGADO: La Loĝiga Servo informas, ke ĉiuj unultitaj ĉambroj jam estas rezervitaj. Nepre ne plu mendu sed faru aranĝon pri divido de ĉambro.

Statistiko: (ĝis fino de marto): Argentino 1, Aŭstralio 2, Aŭstrio 21, Belgujo 13, Brazilo 3, Britujo 80, Cipra 1, Danujo 36, Finnlando 46, FRANCUJO 203, Germanujo 90, Hispanujo 5, Irlando 3, ITALUJO 260, Israelo 1, Japanujo 1, Jugoslavio 54, Kubo 1, Maroko 20, NEDERLANDO 136, Norvegujo 26, Novzelando 1, Portugalujo 6, Sarlando 1, Sudafriko 1, Svedujo 91, Svislando 25, Urugvajo 2, Usono 12. Sumo el 29 landoj 1141. Nemembroj de UEA 23 %. Instruistoj 18 %. Gejunuloj 7 %.

Mason Stuttard,
Konstanta Kongresa Sekretario

kontas, sed sendube Vespasiano ne flaris ĝin pri la enspezita mono!

Nu, ni spertis, ke de la homaj sensoj la flara estas tre facile influata de la imago, kiel Ĥemiistoj de la universitato de Glasgovo, sub gvido de D-ro John C. Brocklehurst, laŭ „British Medical Journal“, ree konstatas post diversaj provoj kun...klorofilo, kiu — miregu — havus nenian odorforpelen kapablon, kiun ankaŭ akvo ne havas. Ili provis per merkaptano, trovebla en la intestoj, per ajlo, etero, per parfumo kaj cepo. Klorofilo estus forpreninta nur la odoron en unu kazo, nome en kiu oni kredis, ke ĝi pli odoris ol la...odoron forpelotan.

Kion ni pensu pri tio? Ĉu necesas aldoni al nia „pri gustoj oni disputi ne devas“ (al kiu „koloroj“ jam mankas) ankaŭ odorojn? Eble jes. Kipling ja skribis, ke odoroj estas pli certaj ol sonoj kaj vidimpresoj, sed antaŭ nelonge aŭdiĝis en nia propra urbdomo, dum konsilantara kunsido, nova „non olet“, en rilato al malagrabla odoroj pro la „sekurec-flamo“ de petro-rafinadojoj. Nome, eminenta membro ĝin estis flarinta kaj same eminenta skabeno ne, kvankam la respektindaj elektantoj jam delonge forvetis sian nazon, ke ili ĉion pri tio sciis.

Tyneverum.

INTERNACIAJ FERIAJ ARANĜOJ

11-a Internacia Junular-Kunveno de T.E.J.O. en L'Aquila, Italujo 7-14/8-'55

En L'Aquila okazos ĉi-jare la 11a Internacia Junular-Kunveno de T.E.J.O. tuj post La Universala Kongreso en Bologna.

L'Aquila estas tre facile atingebla el Bologna.

La kostoj por la tuta semajno (inkluzive loĝado, manĝado kaj tre bela programo, ekskursoj, k.t.p.) estas por TEJO-membroj Liroj 7500,— kaj por ne-membroj Liroj 8350,—.

Anoncu vin al la Loka Organiza Komitato, adreso: Via S-Martino 8, L'Aquila, Italujo, kiu volonte donos informojn kaj havigos aliĝilojn.

Por Nederlandanoj donos informojn: Ben van Moorst., Eendracht-park 19, te BUSSUM.

Franclanda Kongreso

La Nacia Kongreso de Esperanto okazos en Franclando, en la urboj ARRAS (Pas de Calais) la 28an kaj 29an kaj en BOULOGNE SUR MER la 30an de Majo 1955 (Pentekostaj tagoj).

La programo aperis sur FRANCA ESPERANTISTO (numeroj de Marto, Aprilo kaj Majo), sed la Franca Samideanaro volas inviti, tuj nun, la plej grandan nombron da alilandaj Geesperantistoj partopreni tiun Kongreson, kies lasta tago estos dediĉita al la pri-festo de la UNUA UNIVERSALA KONGRESO okazinta en Boulogne sur Mer en Aŭgusto 1905.

La programo de tiu tago estas jena:

- 9a 45: Forveturo de Arras al Boulogne sur Mer.
- 11a 45: Vizito de la lokoj mem kie okazis la Unua Universala Kongreso de Esperanto, sub la Prezidenteco de Doktoro L. L. ZAMENHOF. - Salutparolado de Veterano partopreninta tiun Kongreson.
- 12a 30: Oficiala akcepto ĉe la Urbdomo.
- 13a 30: Tagmanĝo kaj disigo.

Ni volas esperi, ke multaj alilandaj Esperantistoj kunvenos en Arras kaj en Boulogne sur Mer por digne festi tiun 50an datrevenon kaj honori dece la memoron de nia genia Zamenhof.

Ĉiuj informoj estas riceveblaj ĉe la sidejo de la Unuigo Esperantista Franca (UEF) 34 Rue de Chabrol PARIS 10 o (Bv. enmetu internacian Respondekuponon) —

N.B. La nefrancaj aliĝantoj ne devas pagi la aliĝkotizon de la kongreso.

Internacia kurso pri Esperanto kaj geonismo

Kio estas geonismo? Geonismo estas konscio pri faktoj, idearo vivoplena, per kiu Esperantismo ricevas sian gustan enhavon. Ĝi konsideras ĉefe la teron, la vivon, la homon kaj turnas sin for de ĉia seka, senfrukta intelektismo. Ĝi vokas al homoj bonkoraj kaj agemaj. La unua publika renkontiĝo pri geonismo okazos ĉi-jare en Svislando, en la bela, modernigita kastelo Münchenwiler apud Murten (mezvoje inter Bern, Neuchâtel kaj Lausanne). En tiu bela loko, posedajo de la Berna ŝtato kaj administrata de la Berna popola altlernejo okazos en la semajno post la Universala Kongreso en Bologna internacia kurso, kiun gvidos d-ro William Perrenoud, prezidanto de la Svisa Esperanto Societo. Estos semajno de vivanta samideaneco, en kiu oni „per ludo kaj studo“ penetros al „vero kaj libero“, kiel diras la slogano sur la bela ilustrita prospekteto, kiu ĵus aperis. La kurso, kiu inspiras sin de idealo pure Zamenhofa kaj en kiu kunlaboros ankoraŭ pluraj aliaj spertaj kaj kompetentaj svisaj Esperantistoj okazos do de la 7a ĝis 15a de aŭgusto kaj antaŭvidas jenan programon: matene: studo, kunlaboro instruoj; posttagmeze, ekskursoj, liberaj horoj, sporto, ripozo; vespere: amika rondo, prelegoj, diskutoj. La prezo por sep tagoj kun plena pensio estas nur fr.sv. 98.—. Petu la prospekton kaj aliĝilon de Svisa Esperant-Instituto, Hotel Metropole, Bern, Svislando.

Senpaga vojaĝo tra Italujo

18a Julio—7a Aŭgusto

De la Alpoj ĝis Napoli Insularo tra Milano, Torino, Genova, Napoli, Roma, Firenze, Bologna, Venezia, Como-lago.

La lupago de moderna aŭtobuso estas ofert-donaco de Internacia Esperanto-Turismo-Centro, Paris.

Vi pagas nur manĝojn kaj loĝadon en bonaj hoteletoj:

Sv. Frankojn 430 — aŭ It. Lirojn 65.000.

Tiuj kiuj ne deziros profiti nian hoteleservon povos ĝui nur la veturadon kondiĉe ke ili bone scipovu Esperanton kaj kontribuos la repagon de la oleoj por la motoro: nome 8.000 Lirojn po persono.

Petu la programon de tiu-ĉi belega vojaĝo al la gvidonto: Lovati Ange-lo — Milano (629) Via Lipari, 8.

Geesperantistoj! Profitu de tiu nova aranĝo, nura okazo por tre bone kaj bele viziti Italujon malmultekoste!

J. Terrijn.

Esp-ista Kulturdomo

Château de Grésillon, BAUGE (Maine et Loire - Francio).

Specialaj aranĝoj pri „les 24 heures du Mans“.

Okaze de la mondkonata aŭtomobila kurado tiel nomata „les 24 heures du Mans“ (la 24 horoj de le Mans), kiu okazos de la 11-a ĝis la 12-a de junio estas nun preskaŭ neeble trovi loĝejon aŭ ĉambron en la urbo mem, kaj tre malproksime en la ĉirkaŭaĵo.

Por ebligi al eksterlandaj samideanoj ĉeesti tiun faman internacian kuradon, ni intencas malfermi la kastelon, je tiu okazo. Ĝi situas 50 kilometrojn malproksime de le Mans, kaj oni organizos peraŭtobusan transportadon.

Jen la programo:

Alveno la 11-an en la mateno, tagmanĝo kaj je la 12-a kaj duono foriro al la kurejo, kun manĝeto kaj vespermanĝo malvarmaj. Reiro al la Kastelo je la 24-a, tranokto kaj varman trinkaĵoj, ĉe la vekiĝo, laŭ peto; tagmanĝo kaj foriro ĉirkaŭ la 11-a kaj duono por ĉeesti la lastajn horojn de la kurado. Reiro al la kastelo, vespermanĝo kaj foriro. Oni povas fari specialan aranĝon por, kiuj deziras foriri de le Mans mem.

Prezo: 2.700 fr. La ne-esperantistoj, kiuj akompanus samideanojn, povus ankaŭ esti akceptitaj. Por ili la prezo estus 3.000 fr. En tiuj prezoj la transportado estas enkalkulita, same kiel ĉiuj servoj, krom la trinkaĵoj. Por kiuj havus propran aŭtomobilon la transportado estus dekalkulota.

Ĉiuj aranĝoj, laŭ la ĝeneralaj kondiĉoj, estas eblaj por kiuj dezirus alveni pli frue kaj restadi kelkan plian tempon en la regiono.

Esperantista Kulturdomo povas zorgi pri la rezervigo de lokoj en la kurejo, kaj ankaŭ en la aŭtomobila parko.

La stacidomo uzota estas BAUGE, sur la fervoja linio de SAUMUR al TOURS. Aŭtobusa servo estos organizata de la stacidomo al la kastelo.

Ĉiuj pliaj informoj estas riceveblaj, kontraŭ (se eble) respondekupono, de Esperantista Kulturdomo, château de Grésillon, Bauge, (Maine et Loire) Francujo.

Dankojn kaj samideanajn sentojn.

Esperantista Kulturdomo.

Kelkaj Antverpenaj Abonantoj devis pagi krom-afrankon ĉe la alveno de la gazeto. Ili notu ke temis pri eraro de la belga poŝt-servoj. La kromtakso estas repagota, ĉe plendo en la poŝt-oficejo!

BELGA KRONIKO

Prezidanto: S-ro Maur. JACMOTTE, De Bruynlaan, 44, Wilrijk.
Vicprezidanto-Kasisto: S-ro J. Soyeur, 91, Rue du Chêne, Seraing.
Vicprezidantino: S-ino J. Plyson, 185, rue Jourdan, Bruselo.
Generala Sekretario: S-ro H. Sielens, „Internacia Marista Domo“, Falcon-
 rul, 21, Antverpeno.
 (Poŝtĉeknumero: R.B.L.E.: 13.37.67)

La Liga Prezidanto vizitas la Bruselan Grupon

London, la 4an de aprilo, estis granda tago por la Brusela Grupo. Same kiel li faris en Bruĝo, la Liga Prezidanto, S-ro Maur. Jaumotte, vizitis la grupon de la ĉefurbo por honorigi surloke la kunhelpintojn, kiuj laboradis en R.B.L.E. kaj la veteranojn kaj jubileantojn de tiu ĉi Grupo.

S-ro René Jacobs, prezidanto de la Grupo, kore bonvenigis lin kaj esprimis la gojon kaj la dankon de la membroj.

Tiam S-ro M. Jaumotte, en bela improvizado, unue honorigis la kunlaborintojn kaj speciale D-ron Kempeneers, kies ĉeeston li salutis kaj kiun li dankis, ĉar li, dum preskaŭ dudek jaroj, gvidis la Ligon, kaj S-inon J. Plyson, ankaŭ ĉeestanta, kaj kiu, dum pluraj jaroj, lerte prizorgis la kason kaj kiu, ankoraŭ nun kaj est-
 onte, daŭrigas sian kunhelpadon. Li ne forgesis menci i S-ron F. Mathieux, kiu dum dekok jaroj, plenumis la saman kasistan laboron, kaj memorigis Abaton Richardson kaj F-inon Ant. Jennen, iamajn vicprezidantojn de la Ligo.

Li fine esprimis sian gojon, ĉar kun tiuj jam malnovaj gvidantoj kaj kun la nova estraro, kiun li speciale salutis, la Brusela Grupo sentas sin duoble forta kaj iĝos ankaŭ duoble prospera.

Tiam S-ro Jaumotte alvokis la veteranojn kaj jubileantojn kies nomojn ni rememorigas:

Veteranoj: S-ro Fr. Verbanck; S-inoj Félicie kaj Elly Staes; S-ro J. Alofs; S-ino G. Pierre-Gamal; G-roj Jos. kaj Pél. Derks; S-ro Fern. Mathieux; F-ino Sim. Obozinski kaj S-ro Maur. Daems.

Jubileantoj: S-aŭj Louis Everaerts, Henri Hart, Lode Bas. P. Kempeneers, R. Maes, H. Castel; S-inoj Diny Kempeneers kaj Lucy Castel; S-roj R. Brihay, Louis Genin, Edm. Patiny; S-ino Marg. Daems; S-roj Félix Swinne, A. Laurent, René Demot kaj V. Lamberts.

Al ĉiuj S-ro Jaumotte diris apartan vorton, kiu montris ke li vere konas la membraron; kaj, kun siaj gratuloj, li transdonis al ĉiuj la medalon de R.B.L.E.

S-ro Castel poste speciale gratulis ĉiujn en la persono de nia kara S-ino Félicie Staes, al kiu li transdonis belan florgarbon nome de la Brusela Grupo. Kaj al tiu ĉi unua garbo aldoniĝis multaj aliaj, ensenditaj de amikoj de la honorigato. S-ino Staes dankis per kelkaj emociplenaj vortoj.

Fine sekvis agrabla kabareta horo, dum kiu diversaj membroj, per muziko, deklamado kaj kanto, interesigis kaj amuzis la membraron.

ANTVERPENO

Esperanto-Grupo „La Verda Stelo“

(Poŝtĉeknumero: 726.54)

La 1an de aprilo, multaj membroj partoprenis la parolatan ĵurnalon, kun interesaj artikoloj, inter kiuj kompreneble kun aprila karaktero.

La 8an, — Sanktan Vendredon —, la programo estis dediĉata al „La Pasio en la Arto“. S-ro G. Vanderschueren, per lumbildoj, montris diversajn pentraĵojn, kiuj rilatas al la pasio kaj kiujn li komentaris, kaj belajn konstruaĵojn, pri kiuj li ankaŭ donis multajn detalojn. Poste S-ro W. De-roisy prizorgis muzikan parton helpe de la magnetofono kaj de la lumbildaparato, kiujn flegis S-ro J. Montmirail. Li klarigis kaj aŭdigis la ekeston kaj la evoluon de la religia muziko. Li ĝuigis belajn verkojn de Bach kaj Haydn kaj estis en solena atmosfero, ke la prezidanto per varmaj vortoj dankis ambaŭ kunlaborantojn.

La 15an, S-ro J. Montmirail faris al la

membraro la surprizon montri memfaritan filmon pri la jubileaj festoj, organizataj de R.B.L.E. en Antverpeno, en kunlaboro kun la Grupo. Kaj estis por multaj vera surprizo kiam ili vidis sin, dum ili ludis malgrandan rolon. Por ĉiuj estis agrabla refreŝigo de la memoro. Post tiu unua parto, F-ino L. De Winter organizis grandan lotumadon, por kiu la membroj alportis memfaritajn premiojn. Kaj la sinjorino kaj la sinjoro, kiuj kunportis la plej belajn, akiris mem specialan donacon de la Grupo.

La 22an, oni priparolis kelkajn kontraŭdiraĵojn, al kiuj ofte devas respondi ankaŭ novuloj kaj ne-spertuloj. Multaj antaŭmetis tian argumentojn kaj aldonis la respondon

Verreries et Miroiterie DESMECHT & C^o

LA LOUVIERE

S.P.R.L.

Tel. n-roj 223.01 - 225.37

Du esperantaj markoj:

TABULO, por lernejtabuloj; KATOKULO, por signalvitroj.

Por sia vintra provizo

Por sia antracita karbo

la Esperantistoj mendas

ĉe

BELGOMINE

FRANKRIJKLEI, 20

ANTVERPENO

kiu donas specialan premion

kiun ili faris. S-roj Jaumotte kaj De Kete-laere komentaris la kontraŭdiraĵojn kaj la respondojn kaj aldonis pliajn argumentojn. Iĝis unu el la plej viglaj kaj longdaŭraj vesperoj kaj la deziro estis esprimata ke oni ankoraŭfoje organizu similan.

La 29an: F-ino Blanche Geers enkondukis debaton pri „Modernismo en la artoj“. Respondoj sekvis kaj la diskuto iĝis vigla kaj iuj membroj eĉ per lumbildoj plifortigis sian argumentadon.

Ankaŭ tiu ĉi lasta vespero de la monato iĝis unu al le plej agrablaj.

Programo de la venontaj kunsidoj:

Ĉiuvendrede en „Witte Leeuw“. Frank-rijklei 4. je la 20.30a h. (I-a etaĝo).

Junio: La 3an: Parolata Ĵurnalo. Raporto pri la Beneluksa Kongreso; la 10an: Vizito al la Foiro. Kunvenhoro fiksota dum antaŭa kunsido; la 17an: Parolado de S-ro Roger Jaumotte; la 24an: Kabareta Vespere. Diplomdisdono.

G. FAES

16, Schoenmarkt, 16

ANTVERPENO

— Por via MUZIKO,
 RADIO kaj GRAMOFONO

BRUGO

Bruĝa Grupo Esperantista

(Poŝtĉeknumero: 4835.33)

La 29an de marto, post la ĉiusemajna leciono, portretludado agrabligis la duan parton de la kunveno.

BRUGGE

BRUGES

Hôtel du Cornet d'Or

2, Simon Stevinplaats, 2

Centra situo - Moderaj prezoj

— Moderna komforto —

Sidejo de „Bruĝa Grupo Esperantista.“

Tel. 314.59

S-ro Karlo Poupeye faris la 5an de aprilo tre dokumentitan paroladon pri sia profesia fako „Televideo“ kaj pli speciale pri la ricevilaj kaj antenoj. Malgraŭ la tehniko de la subjekto la parolanto sukcesis vekti ĝeneralan interesiĝon.

Dum la dua parto de la kunveno de la 17a de aprilo, S-ro Walter van Werveke aŭdigis kelkajn elektitajn diskojn.

Debato pri „Multaj aŭ malmultaj infanoj“ sekvis al la leciono de la 19a de aprilo. La diversaj partoprenantoj singardeme priparolis tiun malfacilan subjekton ne ofendante religiajn aŭ filozofiajn principojn.

S-ro L. Van Wassenhove faris la 26an de aprilo tre belan paroladon pri „La legendo de la Bruĝaj cignoj“ en kiu li klarigis la devenon de la bredado de cignoj en la Bruĝaj kanaletoj. Vigla aplaŭdo dankis la interesplenan paroladinton. Post tio S-ro Marcel Poupeye fotografis la ĉeestantojn.

Dum la parolata gazeto de la 3a de majo, post raportado de S-ro Ch. Poupeye pri la lastaj administranta kaj ĝenerala kunvenoj de RBLE., estis ankoraŭ S-ro L. Van Wassenhove kiu ĝojigis la kunvenon per gaja rakonto: „Perdo de pijamo“ kaj F-ino P. de Straercke daŭrigis per prezento de kelkaj bongustaj humorajoj. Post la kunveno sekvis komuna vizito al la kermesa foiro.

Programo de la sekvontaj kunvenoj:

Ordinara kunveno: ĉiuarde je la 20a, en la sidejo: „Gouden Hoorn — Cornet d'Or“, Simon Stevinplaats 2.

Dum la unua horo de ĉiu kunveno: Elementa kaj perfektiga kurso. Ankaŭ la malnovaj membroj ĉestu tiun unuan horon.

Dum la dua horo:

Junio: 7an: Triopa interparolado kun posta publika raporto. 14an: Parolado de S-ro W. van Werveke pri: „La artaj lumigadoj en Bruĝo“. 21an: Muzika vespero. 28an: Parolata gazeto.

BRUSELO

Esperantista Brusela Grupo

(Poŝtĉekkonto 12.30.48)

Ĉi antaŭe la legantoj jam trovis detalan raporton pri la honorigo de niaj jubileantoj.

La 11-an, S-ro Vander Stempel pritraktis,

dum perfektiga leciono la komparativajn formojn kaj tion, kiel kutime, tre lerte faris. Je Paska Lundo, la 18an, ne okazis kunveno.

La 25an, F-ino S. Obozinski paroladis pri la belega arbaro de Soignes. Si agrabligis tiun belan paroladon per la monro de admirindajn pejzaĝajn kliŝojn, kiujn ŝi prunte akiris de la Turisma Servo. Estis bela sukcesinta vespero.

Programo de la venontaj kunsidoj:

London, la 6an: Parolata Gazeto, kun speciala rubriko pri la ĵusokazinta Beneluksa Kongreso en Utrecht; la 13an: Diversaĵoj; la 20an: Perfektiga kurso de S-ro Vander Stempel; la 27an: Disdono de la premioj por la unua grado.

VERVIERS

Esperantista Grupo Verviers

La grupanoj kunvenas kaj la perfektiga kurso ankaŭ okazas, ĉiulunde en la hejmo de la delegito S-ro J. Koeune, rue Courte du Pont 17, Verviers (Tel. 137.23).

La nova kurso elementa aliflanke okazas, ĉiumerkrede, en la „Provinca Teknika Lernejo“, rue aux Laines 69, Verviers, kaj estas gvidata de S-ro Profesoro G. Vanbreuse.

Ĉiuj, — ankaŭ eksterurbanoj kaj eksterlandanoj —, estas ĉiam bonvenaj en ĉiuj arangoj de la Grupo.

(Sekvo de paĝo 33)

Kiam grupo, dum tiu antaŭa jaro, pagis por malpli ol dek membroj, la ĝenerala jarkunsido decidis, ĉu ĝi estas ankoraŭ konsiderota kiel efektive laboranta grupo, kiu rajtas, dum unu plia jaro, esti reprezentata en la administrantaro.

B. La aliĝintaj grupoj, kiuj ne estas rekte reprezentataj en la administrantaro kaj la izolaj membroj en lokoj kaj aglomercioj, kie ne ekzistas grupo, rajtas proponi kune po unu administranton por ĉiu kvindek aŭ komenciĝinta kvindek da membroj.

C. Estas laŭrajte administrantoj:

a) la prezidant(int)oj, kiuj funkciis dum almenaŭ dek jaroj;

b) la estraranoj kaj kunlaborintoj, kiuj, en unu aŭ en pluraj funkcioj, plenumis estraranajn taskojn dum almenaŭ dekkvin jaroj;

c) unu delegito de „Belga Esperanto-Instituto“;

d) la ĉefdelegito de U.E.A. (aŭ la persono kiu, en R.B.L.E., eventuale plenumas ties funkcion).

D) La administrantoj, antaŭviditaj sub A, B kaj C rajtas proponi al la ĝenerala kunsido, liston de kandidatoj kooptaj ĝis unu triono de sia nombro.

LES ENTREPRISES

DERKS

226, Rogierstrato, BRUSELO

Tel.: 15.19.92

Entrepreno de

KONSTRUAĴOJ

La estraro konsistas el Prezidanto, unu ĝis tri vicprezidantoj, ĝenerala sekretario kaj kasisto, elektotaj en ĝia mezo, de la administrantaro; kaj krome kaj eventuale el direktoro de la revuo, fakaj sekretarioj aŭ funkciuloj, propagandestro, k.t.p. kiuj povas esti elektataj ekster la administrantaro.

* *

Pro tiuj ŝanĝoj, la administrantaro, jam ekde nun, konsistas el:

Administrantoj A: Antverpeno: S-roj H. Sielens kaj J. Verstraeten; **Bruĝo:** S-roj Ch. Poupeye kaj D. De Meulenaere; **Bruselo:** S-ro R. Jacobs, S-ino M. Weyn kaj S-ro M. Jirousek; **Gen- to:** S-ro Cl. Vandeveldel, kaj **Verviers:** S-ro J. Koeune.

Administrantoj B: S-ro R. Paulus.

Administrantoj C: D-ro P. Kempe-neers (pli ol 10jara prezidanteco); S-ro M. Jaumotte kaj S-ro F. Mathieux (pli ol 15jara estraranaj funkcioj) kaj S-ro G. Van den Bossche, delegito de B.E.I.

Administrantoj D: S-ino J. Plyson, S-roj J. Soyeur kaj Th. Van Ginder-taellen.

La Antverpena Grupo, pro sia membronombro, tamen rajtas prezenti du pliajn kandidatojn. Tiel la administrantoj de la unuaj tri kategorioj nombros 16 kaj la nombro de alektotaj administrantoj povos esti ĝis 5.

Krom la administrantoj proponotaj de „La Verda Stelo“, du pliaj administrantoj do povos ankoraŭ esti alektataj, kiuj estu prefere personoj, kiuj povos akcepti iun taskon en la estrado de la Ligo.

Ni antaŭdankas jam pro ilia preteco kunlabori.

* *

Aldonu ni ke, dum la administrantara kunsido, kiu sekvis la ĝeneralan jarkunveno, kaj pri kiu raporto aperos en la sekvonta numero, S-ino Plyson estis elektata, de siaj kolegoj, kiel vicprezidanto kaj ke ŝa subskribinto kore gratulis sin kaj esprimis la esperon ke, en sia nova funkcio, nia iama kasistino faros al nia Ligo ankoraŭ multajn gravajn servojn.

Maur. Jaumotte

POEZIA ANGULO!

La subajn poemetojn verkis G. A. Becquer kaj mirinde bele esperantigis s-ano H. Castel el Bruselo; ni kore dankas ĉi tiun pro lia bonega kontribuo!

Kiel niaj legantoj scias, aŭ tuj ekkonscios, G. A. Becquer (1837—1870), estas hispana poeto, kiun oni nomas la hispana Musset kaj kiu, ankoraŭ nun, estas unu el la plej amataj poetoj en sia naskiĝlando.

La Harpo.

De ludintino forlasita
En la salono angulet',
Silenta kaj polvokovrita
Staras la harpo, en solec'.

La notoj dormos en la kordoj,
Kvazaŭ birdetoj en branĉar',
Ĝis ilin vekos la agordoj
De blanka man', sur la klavar'.

Kiom da fojoj la genio
Dormas, en fondo de l' anim',
Kiel Lazaro atendente
Ke voĉo krii: „Levu vin,
Kaj iru!”

Se bruas de l' balkon' la konvolvuloj,
Kaj pensas vi
Ke pasas ventsopir', kaj ĝin aŭskultas
Sen emoci':
Eksciu ke, sub foliar' kasita,
Sopiras mi.

Se, apud vi, flustrigas via nomo,
Kaj pensas vi
Ke sonas nur, en via rev', alvoko
De iluzi':
Eksciu ke, al la ĉirkaŭa ombro,
Vin vokas mi.

Se vin korpremo vekas dum la nokto,
Kaj sentas vi
Sur viaj lipoj, ardi brula spiro,
Ne dubu pli
Ke, nevideble, ĉe la flanko via,
Spiradas mi.

Mi mortos antaŭ vi; de longe jam, kaŝita
Profunde en la sin',
La glavon portas mi, per kiu via mano
Mortige vundis min.

Mi mortos antaŭ vi: kaj la spirito mia,
Kun fido kaj obstin',
Ĉe l' pordo de la mort', en daŭra gardostaro,
Sen lac' atendas vin.

La tago post la hor', la jaro post la tago
Senhalte flugos for,
Kaj fine venos vi al tiu perdo frapi,
Je la fiksita hor'.

Gardante nur de vi la polvon kaj la pekon
Forsendos vin la ter';
Per ondoj de la mort' por ĉiam purigitan
De ĉiu mondulcer'.

Kaj tie, kie de l' homaro la murmuro
Finiĝas en la mort',
Samkiel, de la mar', la alfluantaj ondoj
Disiĝas sur la bord';

Nur tie kie, el la tombo jus fermita,
Naskiĝas la senfin',
La tuton, ambaŭ ni, pri kio ni silentis,
Ni tie diros ĝin.

Pro l' dancado lacigita,
Ĉar tro batis ŝia kor',
Sur brak' mia apogita,
Ŝi, de l' bal', sin ŝovis for'.

Inter gazo delikata
Kiun levis ŝia sin',
La plej bela flor' skarлата
Taktomove lulis sin.

Sur kuseno perlamota
Ŝajnis ĝi, sub ŝia spir',
Dormi sub kares' drolota
De diskreta amzeŝfir'.

Ho! mi pensis, tiel povi
Lasi tempon pasi for!
Ho! sur ŝia sino dormi
Kiel vi, feliĉa flor'.

En okul' ŝia larmo brilis.
Mi estis preta je l' pardon'...
Sed la fier' la ploron viŝis
Kaj mia buŝ' restis sen son'.

Mi sekvas vojon, ŝi alian,
Kaj la disiĝo ŝiras nia.
Kial mi tiam ne parolis.
Kaj ŝi! Kial do ŝi ne ploris.

Hazarde, je mondumokazo,
Ŝi foje pasas apud mi,
Kaj ŝi ridetas. Kaj mi pensas:
Kiel povas ridi ŝi!

Sub dolormasko, lipo mia
Resendas rideton al ŝi.
Kaj oni pensas: „Eble ŝi ridas
Kiel ridas mi!”

Hans Christian Andersen

La 2-an de Aprilo ĉijare preskaŭ la tuta mondo festis la 150-jaran naskiĝtagon de la fama dana verkisto kaj poeto H. C. Andersen, kiu ankaŭ por ni, esperantistoj, estas bone konata pro liaj fabeloj tradukitaj en Esperanton de D-ro Zamenhof. Ni ricevis tre interesan artikolon pri la vivo de H. C. Andersen „Avec les compliments de la Légation de Danemark, La Haye” verkitan de S-ro Sven Møller Kristensen kaj tradukitan de S-ro Gustav Kühlmann. Bedaŭrinde la artikolo estas tro longa por presigi ĝin en nia organo, sed ni ne povis ne menciigi ĝin. Eble ĉi tiuj kelkaj linioj instigos niajn legantojn ankoraŭ foje legi la belegajn fabelojn de Andersen, ĉar ili vere meritas tion. Ĉu vi scias ke ekzistas ankaŭ biografio pri H. C. Andersen verkitan de S-ro Chr. Heilskov. La titolo estas: Hans Christian Andersen, Liaj Vivo kaj Verkoj. Mendu ĝin ĉe via Libro-Servo.

J.W.

„Esperanto kaj Libervola Civila Helpservo Internacia”. (Civilservo)

Certe multaj el vi jam aŭdis paroli pri LCHI, kiu laboras en la sama spirito ol Esperanto sed diversmaniere.

La LCHI organizas ĉiujare laborkampojn en multaj landoj, kiuj kunigas gevolontulojn de nombraj landoj por fari kune dum siaj ferioj (kaj ne ricevante salajron) utilan laboron, kies profituloj estas malriĉaj grupoj.

La laboro ne postulas teknikajn konojn sed nur bonvolemon. Oni ofte laboras per ŝoveliloj kaj pioĉoj aŭ penikoj. La virinoj mastrumas aŭ faras ne lacigajn laborojn.

Tiel, LCHI intencas krei interkontraktojn kaj amikecon inter personoj de diversaj landoj. (Ĉu komuna penado ne estas bone rimedo por amikiĝi?). Plie, LCHI volas elpruvi al tiuj, kiuj ne kredas tion ebla, ke la diversaj popoloj povus havi kontaktojn ne nur sur la batalkampoj sed ankaŭ sur la paca laborkampoj por fari laboron utilan por la homaro.

Kaj LCHI deziras starigi modelon de nova landservo, kiu povus iam anstataŭi la militservon.

Ofte iu laborkampoj kunigas gevolontulojn de 10-12 nacioj, kaj, kompreneble la lingvoproblemo estas grava afero. Kutime, oni parolas la lingvon de la lando, kie okazas la laboro, kaj ankaŭ la germanan, la anglan, la francan lingvojn. Estas tempoperdoj por la tradukoj kaj kelkfoje miskomprenoj.

LA EKSPRESIONISMO de VAN GEEL M.

Kvankam abstrakto kaj nedifinebla koncepto, la arto povas tamen esti konsiderata kiel vivaĵo. En la arto, same kiel en la naturo, ekzistas evoluo. Eble tial ke la homo kreis ĝin: la konstanta evoluo de la homa spirito, kun ties ŝanĝiĝoj, estas ja translokata en la arton. Sekve de tio oni ĉiam ekvidas ismojn, kiuj nepre naskiĝis el la homo kaj el ideoj. Unu el tiuj ismoj, la ekspresionismo, estos la temo de mia mallonga artikolo.

Estas neeble doni kompletan difinon de ismo sed, laŭ mi, jena sufiĉas: la ekspresionismo estas artismo, ekestinta ĉe la fino de la XIX-a jarcento kaj en kiu la artisto celas doni bildon, kiu misformas la naturajn formojn por pli forte esprimi tion kio vivas en li, aŭ kion li volas esprimi en la objekto tiel kiel li vidas ĝin. La ekspresionista artaĵo do estas subjektiva kaj ekstreme persona.

Kelkaj Esperantistaj Gecivilistoj proponis la enkondukon de Esperanto por faciligi la internaciajn rilatojn, kaj ofte propagandis por Esperanto al la eminentuloj de la LCHI. Sed, ĝis nun, se ili renkontis simpatian, ili ne ricevis la oficialan subtenon de la estraro, kiu nur povus adoptigi kaj disvastigi Esperanton en Civilservon.

Pluraj Esperantistaj Gecivilistoj devne pripensis la problemon, kaj serĉis alian rimedon por atingi sukceson. Ili opinias, ke simpla maniero elpruvi al la estraro de LCHI kaj al la Civilistoj la grandan taŭgecon de Esperanto por la internaciaj rilatoj, estus, ke multaj Esperantistoj de diversaj landoj renkontiĝu en la laborkampoj de la LCHI. La faktoj propagandus por nia lingvo pli bone ol ĉiuj propagandaj paroloj.

Do, venu, enskribiĝu por labori en la LCHI. Vi trovos simpatian medion, certe pli favoran al Esperanto ol multaj aliaj medioj.

Kiam la lokoj kaj la datoj de la laborkampoj estos fiksitaj por tiu jaro, ni konigos ilin al vi per la esperantista gazetaro. Sed, de nun, la interuloj povas sin turni al:

Service Civil Volontaire International
bureau international
77 boulevard Jean Jaurès
Clichy Seine France.

por peti informojn, aŭ al la nacia sekcio de la LCHI de sia lando se ekzistas sekcio.

La Esperantistaj Gecivilistoj estas petataj skribi al tiu oficejo favore de Esperanto. Ili ankaŭ povus peti, ke estu esperanta parto en la internacia bulteno de LCHI.

Por la Esperantistaj Gecivilistoj
Geo Perra kaj René Lemaire
Lyon, France.

Elsinoro 1955

La Internaciaj FERIAJ Kursoj organizitaj, sub aŭspicio de U.E.A. de s-ano L. Friis refoje okazos ĉi-jare en la Alt-lernejo de Helsingör (Danl.) de la 17-a ĝis la 24-a de julio venonta.

Ekzistantaj de 1931 ili ĉiujare akceptas ĉ. 200 samideanojn en la mirinde bela kaj plaĉa ĉirkaŭaĵo de Elsinoro, norde de Kopenhago.

Oni povas (ne devas) partopreni diversajn kursojn resp. daŭrigan, konversacian, preparan por Cseh-metodaj instruistoj kaj por-infanan, gvidatajn de resp. s-ino K. Zacho, f-ino I. Christensen, s-ro Morariu kaj Moravec. Krome okazos kantlecioj, plaĉaj ekskursoj (i.a. al Svedlando) kaj interesaj vesperoj.

Oni loĝos kaj manĝos en la internacia lernejo mem. La kostoj, sube indikitaj, inkluzivas pensionon kaj kurskotizon: amasloĝejo (10-15 litoj), 115 d.kr.; 2-4 persona ĉambro, 135 d.kr.; 1-persona ĉambro (en apuda privata domo), 155 d.kr.

Antaŭ kaj post la kursoj estos eble partopreni karavanvojaĝojn al Jugoslavujo (3-16/7/55) kaj al Italujo (24/7-8/55).

Anoncu vin nepre antaŭ 23/6/55 ĉe: s-ro L. Friis, Ingemannsvej 9, Aabyhøj (Danlando).

gita tero, por rekonstrui novan kulturon, novan epokon kaj novan feliĉon. La naturalismo havis kiel fonon la naturon en ties kompleta ekzistado; la ekspresionismo havas kiel fonon la ideon en ties tuta realeco.

La ekspresionismo malamike kontraŭas la naturon. Ĝi konstatas ke ankaŭ la scienco nur provas klarigi — per tre kritikeblaj hipotezoj. Ĝi neas ĝian plejpotencon, ĝi dubas pri ĝia vereco. La aĵoj, kiujn la homaro eltrovis kaj uzas, nur obtuzigas ĝian lumon.

La ekspresionismo kredas ke „ĝio estas ebla”. Ĝi estas la monkonceptado de la utopio. Ĝi remetas la homon en la centron de la universo.

Tiu opinio ne estas rezulto de la milito, ĉar jam en 1914 ĝi estas klara. Ĝi fontis el la pesimismo de Schopenhauer, kies komprenon „La mondo estas nia imagaĵo”, ĝi imitas, tamen ne akceptante la azian-Budaistan finkonkludon: „La vivovoĉo estas malbona kaj venkenda”. Ĝi preferis submetiĝi al la tragika optimismo de Nietzsche kiu glorkantas la vivon, precize ĉar ĝi seninterrompe kreas iluziojn. Sub la influo de Nietzsche, la vivkonceptoj riskis tute orientiĝi al la aĵoj de la mondo kaj krude imperialisme pravigi la vokinklinon de la kreanta, forta individuo. La trian, ankoraŭ mankant, forton donis Ruslando, staturoj kiaj Dostojewski kaj Tolstoj; la mistika potencon de la kredo liberiginta for de la intelekto.

Oni kutimiĝis uzi la vorton „ekspresionismo” preskaŭ ekskluzive kiel stilo - kaj ne kiel ĝeneralan vivkoncepton: la motivo estas ke ĝi ekvivis en la arto kaj ke necesis enkonduki traŭnan esprimon. De kiam la pentrarto komencis, aperis jen la verkistoj kun ekspresionistaj poemoj, romanoj kaj dramoj, jen la komponistoj kun ekspresionistaj operoj, jen la pensuloj kun ekspresionistaj filozofioj, jen la politikistoj kun ekspresionistaj reformplanoj. Ĉiuj ĉi verkoj estas nek arbitraj nek kapricaj: la celo — fondi novan moralon — unuigas ilin.

La manifestiĝoj de kubismo kaj futurismo estas nenio alia ol klopodado malkovri stilon. Tial la pentrarto provas forpuŝi per sinteza laboro la analizan procedon de la impresionismo. La spacon en la kubismo, la movon en la futurismo oni konsideras ne plu laŭ la ekstera impresio, sed laŭ la esenco. Abstrakto anstataŭas la sensualismon kun ĝiaj kolorvaloroj. La spirita elemento, ĉiukaze ekzistanta ankaŭ en tiuj ismoj, kaŝas sin sub pure formala problemo.

Temas pri la loko de la rigardanto rilate al la bildo, loko kiun, en la impresionista pentrarto, determinis la interspaco. Bildo kaj rigardanto formis duon. Unu bezonis la alian kaj la finimpreso ekestis inter ambaŭ. En la kubismo kaj futurismo optike kuntenas la rigardanton en la bildprofundon la bildo mem. Ĝi formas kun la observanto unuon: ambaŭ rekte partoprenas en la estigo de la verko.

La unuaj vivosignoj de la nova arto manifestiĝis en Dreseno kie, komence de la XIX-a jarcento, junaj pentristoj trovis unu la alian en la societo „Die Brücke”. En Munĥeno oni rimarkas la rason Kandinski kun liaj teori-aj verkoj: „La spirita Elemento en la Arto” kaj „La Blua Rajdanto”, en kiuj li klarvide formulis la tutan principan revolucion kaj proklamis la militon al la „realu naturo”.

Ankaŭ en la poezio naskiĝis la ekspresionismo kaj ankaŭ tie la slavaj influoj estas rimarkeblaj. La berlinaj revuoj „Der Sturm” kaj „Die Aktion” sendube estis la pioniroj. En la romano, Heinrich Mann teknikne perfekte esprimis la ekspresionismon. Debutinte kiel impresionisto li kreis, en la verko „Die Göttingen”, modelon de epiko ne naturalisma sed naskiĝinta el la spirito. En la filozofio Georg Simmel ebeniĝis la vojoj de la nova pensmaniero. Kvankam skeptike kontraŭante ĉian pasintan doktrinon, li tamen montris la senliman riĉecon de sia intuicio kaj revivigis la pensadon.

En la ĝenerala popola pensovivo akompanis tiun disvolviĝon reveko de la intereso por religiaj problemoj kaj por la religia travivado en ĝia originala formo: tiu de la mistiko.

(Daŭrigota)

NIAJ ESPERANTO-ENIGMOJ KUN PREMIOJ.

PREMION akiris post n-roj 187/188: F-ino C. Boute, Matadi, B. Kongo, por V.E.B.

SOLVOJ.

189. Teatraĵo, adorinda, gazetaro, okulisto, trotaksi, apogseĝo, gardisto, orkestro, neŭtrala, sanktulo, eŭropano, kolorigi, vaporigi, aktorino, servisto, sklavino, episkopo, delegito, nuksarbo, egalpezo, sonorigi, imagebla, maturigi, infaneto, libereco, aviadilo, sovaĝulo.

190. Hor.: merkurokrom, riska, ur-sin, gap, kruta, ilaro, tinktur, pluk, kold, triste, iriz;

Vert.: mirakl, flirt, rosgut, tirkest, uragan, koktel, okupit, lumbrik, rosmar, altir, menton.

191. ŜAJNA SUFIKSO.

Aldonu al la radiko respondanta al la unua klarigo unu el la ŝajnaj sufixoj AD.AN.AR.END.ER. ET. ID. IN. ING. ON. UL. UM. por trovi radikon respondantan al la dua klarigo. La komenciliteroj, legata en la donita sinsekvo, formos proverbon.

1. fumilo/vitra tubo por depreni iom da likvaĵo; 2. parto de veturilo/aparato por malkovri malproksimajn objektojn; 3. regula aranĝo/esprimo de volo; 4. fabela rakonto/publika politika kunveno; 5. ĉefopodio; 6. eldangorigil/herbricia ebenaĵo en Ameriko; 7. nombro/korpoparto; 8. defini iun por ofico/homo sen fiksa restadejo; 9. moralo/reguloj de la eksteraj manieroj en mondumo; 10. ĉiel simildeluzio; 11. forte deziri/medikamento; 12. malagraba sento antaŭ danĝero/malaŭdaca; 13. tero ĉirkaŭata de akvo/rimedo kontraŭ malsano; 14. travida teksaĵo/zorge kultivata herbejo; 15. esti faranta/kajero en kiu oni notas laŭ ĉiu tago la farotajn aferojn; 16. eŭropano/motorciklo.

192. KRUCVORTENIGMO.

Horizontale: 1. homaspekta aŭtomato(R); fiso el kiu oni faras sardinon(R). 2. plenumi sian servon laŭ difinita tempo(R). 3. birdo el tropikaj landoj(R); bonodora fioreto(R). 5. infana paralizo(R). 7. luebla kaleŝo(R); ne havanta

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11
1											
2											
3											
4											
5											
6											
7											
8											
9											
10											
11											

finon(R). 8. estinta(R). 9. noktobirdo(R); aparato por movi pezajn ŝarĝojn(R). 10. arbo(R). 11. longa maldika insekto(R); fruktoj(R).

Vertikale: 1. ostio(R); armilo(R). 2. esti tuj mortonta(R). 3. deklari ion bona(R). 4. orienta konkubino(R); 5. kovri(R); plezurige trakti(R). 6. havi inklinon. 7. suprenliti, kiel senmotora aviadilo(R); alte taksi ies valoron(R). 8. antaŭmalhelpi(R). 9. ŝirajo en virina ŝtrumpo(R). 10. flugilo de multaj insektoj(R). 11. kaŭzi malagrablen pro troripetigo(R); speco de artefarita silko(R).

La solvojn sendu la nederlandanoj al s-ro G.J. Teunissen, Burg. Tellegenstr. 21 hs, Amsterdam-Z.; la membroj de F.I.L.E. aŭ R.B.L.E. al s-ro F. Couwenberg, Koninginnelaan 14, Blankenberge, antaŭ la 22/V/1955.

Anoncetoj

Pasigu vian ferion en vere internacia sfero: en la

ESPERANTISTA KULTURDOMO

„Kastelo de Grésillon”, unu el la kasteloj de la Loire en Baugé, Francujo. Petu informojn al M. de Waard, Anemoonstraat 13, Capelle aan den IJssel (ZH).

La esperantista rondo en Trutnov serĉas korespondamikojn en Nederlando. Bonvolu skribi al: s-ro Galle Oldrich, Stalingradské nám. 130/10, TRUTNOV (Ĉeĥoslovakio).

Hispanioj 20 j. kaj 30 j. deziras restadon en belga aŭ nederlanda familioj kontraŭ domlaboro, kudrado, infanpizorgo. Ne esperant sed francparolantaj. Skribu al F-ino F. Llonch C/Volta, 18, Tarrasa (Barcelona) Hisp.

Deziras korespondi kun brusela aŭ antverpena fraŭlino pri diversaj temoj kaj interesiĝas pri ebla estonta renkonto: 23-jara franca Esperantisto, André Beder, Boulevard Voltaire 47, Asnières (Seine) apud parizo (Franc.)

Esperanto kaj la Turismo

TUTE SEN PAGE oni povas ricevi ilustritan artikolon pri la urbo VALENCIA, en taŭga faldfolio ĵus eldonita de la turisma oficejo. Interesataj skribu prefere per ilustrita poŝtkarto, petante ekzempleron al jena adreso: Sociedad Valenciana Fomento del Turismo, Bajos del Ayuntamiento, Valencia-Hispanujo.